

Chico Xavier

De la Spirito ANDREO LUDOVICO



Kristana Agendo

Verko mediume skribita de
Francisco Cândido Xavier



Francisco Cândido Xavier
(Mediumo)

Kristana Agendo

Diktita de la Spirito

ANDREO LUDOVIKO



Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio
DEPARTAMENTO EDITORIAL e GRÁFICO
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941-040
Rio de Janeiro, RJ – *BRAZIL*O

e

Av. L-2 Norte – Q. 603 – Conjunto F
70830-030 – Brasília-DF – Brasil

2^a eldono

De la 4^a ĝis la 6^a ekzempler-milo

El la portugala lingvo tradukis:
A. K. AFONSO COSTA

5,01-AA; 000.3-O; 10/1991

Copyright 1948 by

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA

(*Brazila Spiritisma Federacio*)

SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte

Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830-030

Kompostado, fotolitografio kaj ofset-presado de

Presejo de la Eldona Fako de FEB

Rua Souza Valente, 17

20941-040 – Rio-RJ – Brasil

C.G.C. n° 33.644.857/0002-84

IE. n° 81.600.503

Impreso no Brasil

PRESITA EN BRAZILIO

Tabelo de la enhavo

	<i>Pĝ.</i>
<i>Informoj al la leganto</i>	9
1. Kristanaj imperativoj	13
2. Savantaj principoj	15
3. Kristanaj privilegioj	17
4. Favore al vi mem	19
5. Evangeliaj medikamentoj	22
6. Por via bono	24
7. Frateca peto	26
8. Estas en danĝero la fratoj	28
9. Dum la konversacioj	29
10. En gravaj momentoj	31
11. Preventa medikamento	33
12. Helpu ĉiam	35
13. Sendube	37
14. Dum	39
15. Jen tiel kondukante, vi recevros profiton	41
16. Kelkaj difinoj	43
17. Vere	44
18. Utilaj konsiloj	46
19. Demando pri elekto	48
20. Logikaj konkludoj	50
21. Semado	51

22.	Krom tio	53
23.	Realaĵo	55
24.	Ŝajnoj	57
25.	Ŝvebu pli alte	59
26.	Se vi deziras	61
27.	Malfacilaj spertoj	62
28.	Efektive	64
29.	Konvenas pensi pri jeno	66
30.	Respondoj al la rapidemo	68
31.	Elmontru vin	70
32.	Signoj	72
33.	Sen tiaj armiloj	74
34.	Kontrolu vin	76
35.	Lernu el la Naturo	78
36.	Laŭ bona logiko	80
37.	Liberugu vian animon	82
38.	Ne difektu vian tagon	84
39.	Kun Jesuo	86
40.	Vi povas kredi	88
41.	Defendu vin	90
42.	Vi mem	92
43.	Personaj problemoj	93
44.	Ŝvebu super ĉio	95
45.	Ĉiam vokata	97
46.	Profitu la oportunan okazon	99
47.	Petoj	101
48.	Konsultu la bonon	103
49.	Helpu vin mem	105
50.	Konkludoj	107

Informoj al la leganto

Multaj amikoj serĉas normojn de konduto kun la sola fiksideo konstrui al si eksterajn vojon ...

Ili volonte ricevas de la spirita mondo rektajn inspirojn, kiuj ilin levus al la altaĵoj de ia facila venko. Per opinioj de elkarniĝintaj fratoj, loĝantaj en aliaj sferoj, ili dezirus reĝustigi negocojn, kiuj koncernas nur ilin mem, abrupte ŝanĝi la mensan sintenadon de karaj personoj, penetri en la sekreton de situacioj, kiujn neatendite kreis aliula libera volo; sed neniu evitos spertadon, kies funkcio estas ĉiam nin instrui kaj plibonigi.

Antaŭ tia realaĵo, ĉia instruo, ne bazita sur la interna harmonio, estas nenio alia ol simpla ĵonglado per vortoj, por ja ofte laŭdinde kaj bonefike pasigi la tempon.

Homo, renoviĝinta por la bono, prezentas fundamentan garantion por la homa feliĉo. Jen kial, antaŭ ĉio, la homo ja devas altiĝi antaŭ la vivo kaj la Universo, kiujn konstante tuŝas, eĉ en iliaj plej etaj anguloj, la mirinda dia agado.

Kiel gvidi okazojn, fari aranĝojn, kontroli manifestiĝojn aŭ harmoniigi inter si elementojn por difinitaj celoj, sen ekvilibro en la fonto de efikoj, situacioj kaj faktoj, sidanta en ni mem?

Transportite al palaco de moderna kulturo, sovaĝulo neniel povus postuli, ke la civilizitoj revenu en siajn iamajn kabanajn por kontentigi lian nesufiĉan komprenemon, kontraŭe: li devas mem instrui sin, por kompreni la progreson de la mondo.

Katenita al la krusto de la Tero, astronomo ne petus la stelojn forlasi la vojon, kiun la kosmaj leĝoj difinis al ili en la senlima spaco, sed li mem devas pliperfektigi siajn optikajn aparatojn por atingi siajn celojn, antaŭ la ĉiela grandeco.

Estus infanaĵo forpeli muŝojn de sur infekta fokuso, pretendante per tio forkuraci la malsanon. Logike ja estas sanigi la fokuson.

La homo, heredanto de la Ĉielo, ĉiam spegulos la Dian Patrecon, laŭ la ŝtupo, sur kiu li staras.

Ni do evitu la malnovajn intencojn facile ricevi senpenajn bonfarojn.

Nemalkonfesebla estas la neceso de kunlaborado sur la evolua vojo.

En ĉiuj departementoj de l' Universo ni ekkonos favorantojn kaj favoratojn. La hierarkio mem, por esti bone praktikata, baziĝu sur principoj de solidareco.

Sene konvenas malŝati favoron, ni tamen ne faru el la protekto koruptadon.

Tiel komprenebla estas konstanta helpado al delikata juna planto, kiel natura estus apogilo al utila vegetaĵo superŝarĝita per fruktoj. Tamen ni, Spiritoj, alkiutimiĝintaj al instruoj pri la senmorteco, posedas sole nur embrian klerecon kaj ankoraŭ staras tre malproksime de superproduktado sur la kampoj de bono. Ni estas Spiritoj de homoj jam sen la komenca sensperteco, sed al kiuj mankas virtoj, sub la prava neceso prilumi la konsciencon,

plibonigi sentojn kaj perfektigi la individuajn kvalitojn, por ne vane ricevi la benojn de la Sinjoro.

Ĉi tiu malgranda kurso de Spiriteco, kiun Andreo Ludoviko verkis, ne estas vantema kolekto da rekomendoj de rigorulo. Ĝi estas amika mesaĝo por tiuj homoj, kiuj petas konsilojn de Spiritoj, kvazaŭ la vera savanta laboro estus ekster tiuj homoj mem. Ĝi prezentas la parolon el nia kampo de batalado, kie ni lernas, ke la miraklo de la perfektigo estas rezultato de klopodado, konado, disciplino, altiĝo, servado kaj pliboniĝo en la templo de la "mi".

Ĝi do ne estas ia pedanta lernolibro.

Ĉi tie, leganto-amiko, vi trovos nur ripeton de la instruoj de la Majstro, en nova vorta aranĝo, ke ni rememoru kun Li, ke la Dia Regno – konstruo de Dio en la homo – vere neniam ekaperos en la mondo per eksteraj ŝajnoj.

EMMANUEL

Pedro Leopoldo, la 18an de Junio 1947.

1**Kristanaj imperativoj**

Lernu – humile.

Instruu – per ekzemploj.

Administru – edukante.

Obeu – serveme.

Amu – edifante.

Timu – vin mem.

Suferu – kun profito.

Parolu – konstruante.

Aŭdu – bonvoleme.

Helpu – altigante.

Subtenu – levante.

Trairu – servante.

Preĝu – trankvile.

Petu – saĝe.

Esperu – laborante.

Fidu – agante.

Konfidu – gardante.

Ricevu – disdonante.

Akceptu – ĝentile.

Kunlaboru – sen alligiteco.

Komplezu – plibonigante.

Esploru – savante.

Klarigu – respekteme.

Semu – sen aflikto.

Studu – perfektigante.

Marŝu – kun ĉiuj.

Antaŭeniru – kun utileco.

Agu – por ĝenerala bono.

Korektu – bonkore.

Pardonu – ĉiam.

2**Savantaj principoj**

Ne forgesu, ke Dio estas la lasta celo de niaj destinoj.

Deziru feliĉon al la aliaj tiom, kiom vi deziras vian propran feliĉon.

Interkonsentu senprokraste kun viaj kontraŭuloj.

Respektu la opinion de viaj najbaroj.

Evitu malagrablajn kverelojn.

Pruntedonu, ne atendente redonon.

Donu kun ĝojo vian kunlaboradon por la bonaj verkoj.

Ne zorgu pri la kalumniantoj.

Danku la malamikon pro la valoro, kiun li atribuas al vi.

Helpu la infanojn.

Ne forlasu la maljunulojn kaj malsanulojn.

Pensu pri vi la lasta en ĉia interkonkurado de bonfaroj.

Senkulpigu sincere.

Riproĉu nenium.

Rebonigu viajn mizeraĵojn, antaŭ ol korekti la aliulajn.

Uzu fidon kaj saĝon.

Lernu semi, preparante bonan rikolton.

Ne petu vinberojn de dornarbeto.

Liberigu vin de la pezo de troaj formalajoj.

Praktiku la simplecon.

Parolu kiel eble plej malmulte pri vi kaj viaj problemoj.

Stimulu la noblajn kvalitojn de viaj kunuloj.

Laboru por la bono de ĉiuj.

Valorigu la tempon.

Aranĝu metode vian laboron, sciante, ke ĉiu tago alportas siajn taskojn.

Ne afliktiĝu.

Servu al ĉiuj sen ligiĝo.

Estu gajhumora, justa kaj dankema.

Neniam trudu viajn vidpunktojn.

Memoru, ke la mondo ne estas farita nur por vi.

*

La hodiaŭaj sociaj sciencoj prezentas ĉi tiujn principojn kiel novaĵojn. Tamen ili estas malnovaj. Ili venis sur la Teron pere de la Kristo, antaŭ preskaŭ dudek jarcentoj. Sed ni, Spiritoj kun malgranda komprenpovo, malfruas kun ilia praktikado.

3

Kristanaj privilegioj

Tenadi ekstreman fidelecon al Dio.

Forgesi siajn proprajn dezirojn, konsiderante la
Superajn Decidojn.

Humiliĝi, ke nur la mano de la Sinjoro estu glorata.

Konkeri sin mem.

Rezigni kun ĝojo, por la bono de aliaj.

Ĉerpi profitojn eternajn el perdoj forpasemaj.

Labori por la konstruado de la Dia Regno.

Esperi, kiam aliaj malesperas.

Penetri en la templon de l' silento meze de
voĉobruado.

Gardi fidon super la turmentado de l' duboj.

Ĝustatempe silenti por ne vundi.

Paroli kun utileco.

Aŭskulti la Dian Amikon en plena soluleco.

Servi sen ia rekompenco.

Kuraĝe porti sian propran krucon.

Suferi, lernante kaj profitante.

Ami sen postuloj.

Sekrete helpi.

Semi kun la Kristo, ne alkroĉante sin al rezultatoj.

Ĉie trovi fratojn.

Nutri la plezuron esti utila.

Taksi la ĝustan valoron de la kaŭzoj kaj aĵoj.

Sanktigi la malbonon.

Sincere helpi la erarantojn.

Pardoni tiom, kiom necese.

Superi la malfacilaĵojn.

Konservi bonhumoron kaj mildecon.

Tenadi f ortanimecon.

Liberiĝi el la iluzioj de la mondo, antaŭ ol la mondo
seniluziigos nin.

Persisti en la bono ĝis la fino.

4**Favore al vi mem**

Lernu cedi favore al multaj, por ke iuj venu helpe al vi en malagrablaj situacioj.

*

Helpu sen postuloj, por ke aliaj vin helpu sen plendoj.

*

Ne katenu vian najbaron al via pensmaniero; havigu al via kamarado la oportunan okazon preni la vivon tiel libere, kiel vi.

*

Atentu, kiel vi parolas; en pluraj okazoj manieroj parolas pli elokvente ol vortoj.

*

Kiel eble malmulte parolu pri vi; partoprenu frate en la ĝojo de via proksimulo.

*

Evitu tro longan parolon; kiu konversacias sen interrompo, tiu lacigas la aŭskultanton.

*

Lasu al via frato la aŭtorecon de la bonaj ideoj kaj ne ĉagreniĝu, se oni forgesos vin, konvinkite, ke la noblaj iniciatoj efektive ne apartenas al vi, ĉar ĉiu bono originas de Dio.

*

Rigardu vian kontraŭulon kiel portanton de ekvilibro; se ni bezonas amikojn, kiuj nin stimulas, ni bezonas ankaŭ iun, kiu montras niajn erarojn.

*

Diskutu trankvile; via opozicianto havas rajtojn egalajn al la viaj.

*

Se vi tro alte taksis la kritikojn de malsuperulo, eltenu sen ĉagreno la trudojn de la rondo, en kiun vi vin ĵetis.

*

Estu utila ĉie, sed ne pretendu plaĉi al ĉiuj; ne intencu tion, kion eĉ la Kristo ne sukcesis ankoraŭ realigi.

*

Rimarkinte eraron, korektu ĝin unue en vi mem kaj poste en la aliaj, sen perforto kaj malamo.

*

Se vin trafos perfido, rifuzu honori ĝin per indigno; pririgardu ĝin kun silenta rideto, trankvilanime esploru ĝian procedon kaj, post tio, faru el ĝi materialon indan je la vivo.

*

Frate korektu enviulon; envio estas nemaskita honoraĵo al merito, kaj la ordinara homo, pagante tian tributon, sin turmentas kaj suferas.

*

Alkutimiĝu al trankvilo kaj braveco en la rondoĵ de la homa lukto; sen tiuj konkeroj vi malfacile eliros el la sinsekvoj de la malsuperaj reenkarniĝoj.

5

Evangeliaj medikamentoj

Helpu ĉiam.
Nenion timu.
Neniam malesperu.
Lernu senĉese.
Pensu multe.
Meditu pli.
Malmulte parolu.
Korektu kun amo.
Laboru feliĉa.
Direktu saĝe.
Obeu ĝoje.
Ne lamentu.
Iru antaŭen.
Atentu transe.
Vidu malproksime.
Diskutu serene.
Lumigu ĉirkaŭ vi.
Dissemu pacon.
Disverŝu benojn.
Luktu altigante.

Estu gajanima.

Vivu sentime.

Elmontru kuraĝon.

Portu trankvilecon.

Respektu ĉion.

Preĝu kun fido.

Viglu bonvoleme.

Antaŭeniru plibonigante.

Servu hodiaŭ.

Esperu al la morgaŭo.

6

Por via bono

Ne koleru kontraŭ senklerulo; certe li ne disponis la oportunajn okazojn, kiuj prilumis vian vojon.

*

Evitu kverelojn kun fanatikaj personoj; ili ankoraŭ restadas en la karcero de ekskluzivismo kaj meritas kompaton, kiel ĉiu katenito.

*

Ne konfuziĝu pro malbonedukito; malĝentila frato plej ofte havas difektitan hepaton kaj malsanajn nervojn.

*

Helpu ŝanceliĝantan kamaradon; eble li ne havas eĉ tion nepre necesan, dum vi havas superfluaĵojn.

*

Ne koleru kontraŭ sendankulo; li kredeble esta homo senkonsila aŭ sensperta.

*

Helpu eraranton; viaj piedoj paŝas sur tia sama tero kiel liaj, kaj se vi havas rimedojn por korekti, vi tamen ne rajtas mallaŭdi.

*

Senkulpigu defalinton; li estas malkuraĝulo, sed poste li revenos al la leciono.

*

Protektu malsanulon; danku al la Dia Povo por la ĝisnuna ekvilibro de viaj organoj.

*

Forgesu akuzanton; li ne konas vian aferon ekde ĝia komenco.

*

Pardonu maliculon; la vivo zorgos pri li.

7

Frateca peto

Helpu per via preĝo ĉiujn viajn fratojn:

kiuj neniam trovas tempon aŭ rimedojn por esti utila al iu;

kiuj sin sentas ĉie vundataj de aliula maldankemo;

kiuj vindas al si la okulojn per nigra tolaĵo, por vidi malbonon en ĉiaj situacioj;

kiuj rigardadas mil kastelojn en la aero, sed ne ekbruligas eĉ unu kandelon sur la tero;

kiuj nur laboras en la ebura turo de sia persona kulto, ne malsuprenirante ĝiajn ŝtupojn por kunlabori kun la ceteraj;

kiuj sin kredas specialaj senditoj kaj kreditoroj je privilegioj;

kiuj konsumas altvaloran tempon de la aŭdantoj, parolante ekskluzive pri si mem;

kiuj rezignas lernadi plu en la homa lukto;

kiuj gardadas pardonpeton por ĉiuj siaj kulpoj;

kiuj pretendas la rolon de korifeoj en la mondumo;

kiuj sin opinias nepraj centroj de la ĝenerala intereso;

kiuj sisteme kultas malsanon kaj malhelpadon kontraŭ ĉio.

Ili estas suferantoj de grava malsano, bezonantaj la Silentan Helpon.

8

Estas en danĝero la fratoj:

kiuj pretendas en unu tago plibonigi la proksimulon per parola vipado;

kiuj eltrovas spritajn opiniojn kaj bonajn kosilojn por ĉiuj personoj, flanken metante siajn proprajn problemojn;

kiuj lokas sian menson absolute en alia mondo, ne zorgante siajn devojn en la mondo, en kiu ili spiras;

kiuj senĉese tenadas la fiksideon sin defendi;

kiuj faras dek mirindajn projektojn en ĉiu tago, ne konkretigante eĉ unu en dek jaroj;

kiuj rekonas la grandecon de la diaj veraĵoj, sed neniam havas tempon por ilin efektivigi favore al la klarigo de sia propra menso;

kiuj senfine prokrastas ĝis morgaŭ la servon de komprenado kaj de amo al la proksimulo;

kiuj konsideras sin kiel ekskluzivajn mastrojn de ĉiuj laboroj sur la kampo de karito, ne havigante al aliaj okazojn por servo;

kiuj deklaras pardonon ofendon, sed neniam sukcesas forgesi la malbonon;

kiuj trovas okazon tediĝi de la vivo.

9

Dum la konversacioj

Ne koleru kontraŭ via kunparolanto, kiam li ne respondas al via atendo. Eble vi ne uzis sufiĉe klaran esprimon.

*

Se demandito ne tuj atentigas vin, ne protestu. Li eble estas balbutulo, kaj se li ne estas tio, lia malĝentileco per si mem estas malfeliĉo.

*

Kiam iu ne donos al vi la petitan informon kun la preteco, kiun vi deziras, ne ĉagreniĝu. Rememorigu al vi, ke surdeco povas atingi ĉiujn.

*

Evitu temojn, kiuj malplaĉas al aŭdanto. Ni ĉiuj bedaŭrinde havas dolorigajn punktojn, pri kiuj ni bezonas silenti.

*

Ne sencele demandu. Kiu multe demandas, tiu forte vundas.

*

Estu ĝentila al la oficistoj en ia ajn institucio aŭ establejo, kie vi troviĝas. En tiuj lokoj via menso ne estas premata de zorgoj kaj ne konas la problemojn de tiu, kiu venas servi al vi.

*

Estu lojala, tamen detenu vin de vundanta malkaŝemo. Sub la preteksto esti realisto, ne volu esti pli vera ol Dio, nur de kies Amplena Aŭtoritato ni ricevas la revelaciojn kaj laborojn de ĉiu tago.

*

Se iu via amiko vundas al vi la orelon per respondo ne ĝentila, tenu vin trankvile kaj atendu la tempon. Li eble jam ĝentile respondis naŭdek naŭ fojojn al aliaj personoj aŭ eble ĵus suferis gravan perdon.

*

Helpu konversaciante. Bona parolo ĉiam benefikas.

*

Memoru, ke la malbono neniam meritas komenton.

10

En gravaj momentoj

Estu flegma. La vivo povas esti bona stato de lukto, sed militstato neniam estos bona vivo.

*

Ne tro rapide decidu. La cirkonstancoj, fruktoj de la Superaj Planoj, ĉiuminute aliigas niajn spertojn.

*

Evitu neoportunajn larmojn. Ploro povas kompliki la enigmojn, anstataŭ ilin solvi.

*

Se vi grave eraris, ne ĵetu vin en malesperon. Restariĝo estas la plej bona rimedo de la falinto.

*

Estu pacienca. Se vi ne sukcesas vin regi, vi vane klopodos pri kompreno ĉe iu, kiu vin ankoraŭ ne komprenas.

*

Se via afero estas tro kompleksa, atendu ankoraŭ unu tagon aŭ unu semajnon, por solvi ĝin. La tempo ne vane pasas.

*

Pretekstante defendi iun, ne enŝoviĝu en bruantan rondon. Kelkaj homoj faras multe da bruo pro simpla afero de gusto.

*

Estu modera en viaj decidoj kaj sintenoj. En gravaj momentoj nia spirita realeco estas pli videbla.

*

Pri ĉia konsiderado de la personeco de viaj kunparolantoj aŭ de aliaj homoj estu singarda. En aliaj okazoj, aliaj personoj estos vokitaj paroli pri vi.

*

Neniam proklamu viajn proprajn meritojn, ĉar ĉia bonega kvalito estas duba en la kadro de niaj akiraĵoj. Memoru, ke virto estas ne voĉo parolanta, sed potenco disradianta.

11

Preventa medikamento

Multe pensu, antaŭ ol diskuti. Diskutanto estas kelkfoje nura senpripensulo.

*

Ne tro uzu kuraĝon. Troa kuraĝo ofte estas nur malsaĝeco.

*

Atentu vian manieron praktiki la veron. Multaj homoj, kiuj supozas sin veremaj, estas portiloj de konfuzo kaj senkuraĝigo.

*

Agu inteligente en ĉiaj situacioj; tamen ne forgesu, ke multaj inteligentaj homoj estas efektivaj friponoj.

*

Estu fortanima en la ĉiutaga batalado; tamen ne forgesu, ke multaj bravaj kamaradoj estas senkonsciaj memmortigantoj.

*

Estimu efikecon, tamen, pretekstante rapidecon, ne agu senpripense.

*

Ne alfrontu danĝeron, sen rimedoj por ĝin nuligi. Kion ni rigardas kiel kuraĝon, tio ofte estas nur frenezajo.

*

Estu ĉiam brava en via sintenado. Memoru tamen, ke braveco ne konsistas en ajna venko, sed ja en tio, ke oni gajnu al si la kontraŭulon per paca laboro.

*

Estu bonanima, tamen modera en viaj entreprenoj. Inter aŭdaco kaj krimo estas la distanco de nur kelke da paŝoj.

*

Montru vin afabla kaj milda sur via vojo. Ne konsumu tamen vian tempon per senutila babilado.

12

Helpu ĉiam

Fronte al la nokto, ne akuzu mallumon. Lernu fari lumon.

*

Vi vane kondamnis marĉon. Helpu ĝin puriĝi.

*

Sur ŝtonplena vojo, ne ĵetu ŝtonojn sur la aliajn. Faru el la ŝtonoj utilaĵojn.

*

Ne malbenu aliulan voĉbrudadon. Donu ian profitan lecionon per via silento.

*

En malfacilaj situacioj ne estu perpleksa. Alfrontu ilin kun pura konscienco.

*

Vi vane kritikus dornarbeton. Forigu ĝin bonkore.

*

Ne riproĉu sterilan grundon. Anstataŭ tio, donu al ĝi sterkon.

*

Ne malbenu dezerton. Helpu fosi puton tra ĝia brulanta sablo.

*

Elmontras nenian superecon malaprobi tiam, kiam ĉiuj malaprobis. Helpu vian fraton per bona parolo.

*

Estas ĉiam facile rimarki la malbonon kaj trovi ĝian farinton. Tamen tio, kion la Kristo atendas de ni, estas eltrovi kaj faradi la bonon, por ke la Dia Amo estu glorata.

13

Sendube

Tempesto timigas. Tamen ĝi plifortigos nian rezistemon, se ni scios ĝin ricevi.

*

Doloro disŝiras. Tamen ĝi plibonigos nian koron, se ni penos preni el ĝi profiton.

*

Luktado konsternas. Tamen ĝi havigas al ni nekalkuleblajn bonaĵojn, se ni akceptas ĝian helpon.

*

Nekompreno doloras. Tamen ĝi donas al ni bonegan okazon kompreni.

*

Malespero detruas. Tamen en ĝi ni trovas okazon tenadi trankvilecon.

*

Malamo nigrigas. Tamen ĝi senvualigas benatan horizonton por la elmontriĝo de amo.

*

Aflikto frakasas. Tamen ĝi malfermas pordojn por konsola ago.

*

Morala ekbato konsternas. Tamen el ĝi ni ĉerpas benindan renoviĝon.

*

Elprovado torturas. Tamen sen ĝi lernado ne estas ebla.

*

Malhelpaĵo ĉagrenas. Tamen ĝi estas efektiva faktoro de altigo kaj kapabligo.

14

Dum ...

Penu agi por la bono, dum vi disponas tempon. Estas danĝere havi la kapon ĉiam plena de revoj, sed la manojn senokupaj.

*

Ekbruligu vian lampon, dum estas hele ĉirkaŭ viaj paŝoj. Neniu vojiranto evitos la surprizojn de la nokto.

*

Helpu vian proksimulon, dum estas al vi eble. Venos momento, kiam vi devos akcepti lian helpon.

*

Uzu vian fizikan korpon por ricevi la benojn de la Plej Alta Vivo, dum ĝiaj organoj harmonie funkcias. Vazo enhavinta malvulgarajn esencojn, eĉ forlasite, ankoraŭ elspiras parfumon.

*

Raportu saĝe la lecionojn, kiujn vi ricevas en la lernejo de la vivo, dum vi disponas la karnan libron de ekzamenoj. Lerni estas beno, kaj miloj da fratoj, ne malproksime de vi, atendas stipendion por la enkarna lernejo.

*

Realigu viajn kontojn kun la najbaro, dum la horo estas favora. Morgaŭ ĉiuj bildoj povos aperi transformitaj.

*

Neniu devas esti profeto pri la morto nek imiti noktuon malbonaŭguran. Sed dum vi havas okazon kolekti al vi superajn rimedojn por la spirita vivo, pligrandigu viajn proprajn meritojn kaj akiru trezorojn de la animo, konvinkite, ke via transiro en alispecan ekzistadon estas neevitebla.

15

Jen tiel kondukante, vi ricevos profiton

Reanimu senesperulon. Vi ne evitos la tentojn de senkuraĝiĝo en la sferoj de lukto.

*

Restarigu falinton. Vi ne scias, kie viaj piedoj falpuŝiĝos.

*

Etendu vian manon al tiu, kiu bezonas helpon. Venos tago, kiam vi mem bezonos kunlaboron.

*

Helpu malsanulon. Via animo ne uzas nemalsaneman korpon.

*

Penu kompreni malpli klarmensan kamaradon. Vi ne ĉiam havas rimedojn por kompreni tiel, kiel necese.

*

Gastigu malfeliĉulon. La ĉielo ne ĉiam estas tute blua por viaj okuloj.

*

Toleru senklerulon kaj helpu lin. Rememorigu al vi, ke ekzistas Altegaj Spiritoj, kiuj nin subtenas kaj helpas per heroa boneco.

*

Konsolu malĝojanton. Vi ne povas antaŭvidi la surprizojn de via propra sorto.

*

Helpu ofendanton per viaj bonaj pensoj. Li nin instruas, kiel ofendaj kaj malagrablaj ni estas, kiam ni vundas iun.

*

Estu bonvolema al viaj dependantoj. Ne forgesu, ke eĉ la Kristo devis iam obei.

16

Kelkaj difinoj

Bonfaranto – estas tiu, kiu helpas kaj foriras.

Amiko – tiu, kiu silente helpas.

Kamarado – tiu, kiu kunlaboras neniam ĝenante.

Renoviganto – tiu, kiu renoviĝas por la bono.

Fortanimulo – tiu, kiu scias esperi en paca laborado.

Klarmensulo – tiu, kiu konas sin mem.

Kuraĝulo – tiu, kiu nenion timas pri si mem.

Defendanto – tiu, kiu kunlaboras sen konfuzo.

Laboremulo – tiu, kiu agadas profite al ĉiuj.

Venkinto – tiu, kiu sin mem venkas.

17

Vere

Sanktulo ne kondamnas pekinton, sed helpas lin sen aroganteco.

*

Klerulo ne mokas senklerulon, sed lin frate instruas.

*

Iluminato ne insultas homon, irantan en mallumo, sed heligas al li la vojon.

*

Instruisto ne akuzas sensperton lernanton. Ŝafo malfirmpaŝa ja la plej multe bezonas paŝtiston.

*

Bonkorulo ne persekutas maliculon, sed helpas lin pliboniĝi.

*

Forta ne riproĉas malfortan, sed helpas lin starigi.

*

Humilulo ne evitas fierulon, sed silente kunlaboras favore al li.

*

Sincerulo nenium konfuzas, sed ĉiujn harmoniigas inter si.

*

Modestulo ne kritikis vantemulon, sed silente helpas lin, kiam necese.

*

Kristano ne malamas nek vundas, sed sekvas la Kriston, servante al ĉiuj.

*

Alie ĉio, kion ni titolas per “virto”, estas nenio krom eksterajo, kiun la tempo detruas.

18

Utilaj konsiloj

Ne petadu senĉese la Spiritojn pri orientado. Se vi jam havas du semajnojn da kristaneco, vi do tre bone scias, kion vi devas fari.

*

Ne malŝparu viajn fortojn, provante iel ajn korekti aliajn. Kiam ni korektas nin mem, ni rekonas, ke la mondo estas regata de la Dia Saĝo kaj ke estas nia plej ĉefa devo konstante kunlaboradi por la bono.

*

Ne akuzu suferantajn Spiritojn pro viaj fiaskoj en la lukto. Atentu la ritmon de via propra vivo, pensu pri viaj enspezo kaj elspezo, viaj agoj kaj reagoj, viaj manieroj kaj sintenoj, viaj kompromisoj kaj decidoj, kaj vi rekonos, ke vi havas tian situacion, kian vi mem serĉas al vi, kaj ke vi rikoltas ĝuste tion, kion vi semas.

*

Ne faru al vi kutimon peti helpon de la spiritaj amikoj pri banalaj devoj, kiuj koncernas vin sur la ordinara vojo. Ili estas tiel okupitaj kiel vi mem kaj havas problemojn pli gravajn ol viaj, devojn pli pezajn kaj urĝajn, kaj vi, en la ordinara lukto sur la Tero, ne kuraĝus peti grandaniman kaj bonvolan instruiston ludi la rolon de vartistino.

*

Ne atendu la morton por solvi problemojn de la vivo nek pretekstu malsanon aŭ maljunecon por ne lerni, ĉar ni staras treege malproksime de la ĉielo. La tombo ne estas aŭguristo kun multe da miraklaj promesoj, sed nur pli larĝe malfermita enirejo en nian propran konsciencon.

19

Demando pri elekto

Serĉu krimulon kaj vi trovos multe da malbonfarantoj. Tiam estos necese, ke vi havu multege da amo por ilin revirtigi, ne fariĝante mem krimulo.

*

Penu trovi kulpon, vi konstatos multenombrajn. Veninte al tia situacio, vi nepre devas esti sufiĉe prudentaj, por ne aldoni viajn erarojn al tiuj de la aliaj.

*

Provu lokalizi dornon, vi renkontos plurajn dornarbetojn. En tia delikata situacio, estas necese, ke vi konservu la ekvilibron de via spirito por ne vundiĝi.

*

Rigardu tro atente ŝtonon sur la vojo, la tero baldaŭ

kovriĝos per ŝtonoj antaŭ viaj okuloj. Tiam vi devas esti sufiĉe rezistema, por ne fali ĉe la malglataĵoj de la vojo.

*

Alproksimiĝu al bono. Serĉu ĝin decide, bono venos prilumi al vi la vojon. Nur tiam vi estos plene armita, por venki malbonon.

20

Logikaj konkludoj

Pacienculo neniam malesperas.

Malkvietulo plendas nun aŭ poste.

*

Kuraĝulo eltenas la malfacilaĵojn, superante ilin.

Riskemulo alfrontas danĝerojn, ilin ne pesinte.

*

Prilumito brilas.

Teoriulo tro multe parolas.

*

Frato pripensas ian manieron helpi.

Kontraŭulo serĉas vundorimedojn.

*

Ordinara homo helpas laŭ siaj inklinoj.

Kristano ĉiam helpas.

21

Semado

Via grandanimeco altiros aliulan bonecon helpe al
vi.

*

Via simpleco solvos problemojn por multaj homoj.

*

Via komplekseco naskos multe da hipokritaĵoj ĉe via
proksimulo.

*

Via indiferenteco kaŭzos evidentan malvarmecon en
la aliaj.

*

Via sincera deziro pri paco garantios trankvilecon
sur via vojo.

Via militemo donos al vi semojn de malkvieto.

*

Via vundanta malkaŝemo rericevos krudajn frazojn.

*

Via bontoneco naskos decajn manierojn ĉe via akompanantoj.

*

Via supera spiriteco stimulos plej grandiozajn spiritajn konstruojn.

*

Ni ĉiutage semas kaj rikoltas. Ankaŭ la vivo estas grundo, eterne ricevanta kaj produktanta.

22

Krom tio

Ne sufiĉas, ke via buŝo estas parfumita. Ĝi estu ankaŭ nevundema.

*

Estas grave, ke viaj manoj montriĝu puraj. La ĉefa afero tamen estas kontroli, kion ili faras.

*

Bona aŭdado certe estas trezoro. Tamen la Dia Justeco deziras ekscii, kiel vi aŭdas.

*

Bonega vidado estas laŭdinda kvalito. Tamen estas interese konstati, kiel vi vidas la vivon.

*

Fizika sano estas valora bono. Tamen estas necese konsideri, kion vi faras per la sana korpo.

*

Klara rezonado estas virto. Tamen estas nepre necese observi, en kia mensa regiono vi rezonas.

*

Forta imagpovo signifas porti kun si mirindan kastelon. Tamen estas devo kontroli la imagaĵojn, per kiu vi loĝigas vian internan palacon.

*

Granda emociiĝemo karakterizas internan riĉon. Tamen estas necese scii, kiel vi uzas viajn emociojn.

*

La ebleco multe produkti estas altvalora kapablo. Tamen estas necese koni la esencon de viaj produktaĵoj.

*

Kapableco facilmove iradi tra la vivo estas beno. Tamen ne malatentu la direkton de viaj piedoj sur la vojoj.

23

Realaĵoj

Tiu pajaco, kiun vi mokas, ofte estas brava soldato de la fortanimeco.

*

Tiu tro ornamita virino, kiun vi kutime malaŭdas, ofte tiele agadas, por helpi multe da laborantaj manoj.

*

Tiu kantistino, kiu dancas ridetante kaj de kiu vi kutime apartiĝas kun naŭzo, supozante, ke vi tiel sindanĝerigos vian virton, ordinare penas perlabori panon por multe da malriĉaj familianoj; tial ŝi meritas estimon kaj respekton.

*

Tiu elegante vestita sinjoro, kiu ŝajnas al vi mallaborema kaj senutila, eble plenumas tiajn laborojn, kiajn vi neniam kuraĝus fari.

*

Ne juĝu vian proksimulon laŭ liaj vestoj aŭ vizaĝo.
La vero, same kiel la Regno de Dio, neniam sin montras
sub eksteraj ŝajnaĵoj.

24

Ŝajnoj

Ne akuzu fraton, kiu ŝajnas pli riĉa. Eble li estas simple sklavo de ŝuldoj.

*

Ne kondamnu tiun vian kamaradon, sidigitan sur aŭtoritatan seĝon. Supozeble li estas nura ŝuldanto al la popolo.

*

Ne enviu administranton, dum vi obeas. Eble li estas torturata homo.

*

Ne malŝatu kolegon kondukitan al pli alta rango. La respondeco, pezanta sur liaj ŝultroj, eble estas por li senĉesa turmentado.

*

Ne mallaŭdu virinon, kiu sin prezentas riĉe vestita.
Lukso eble estas al ŝi amara provado.

*

Ne kritiku ĝentilajn personojn, kiuj unuavide ŝajnas
nesinceraj. Eble ili estas evitantaj gravegajn krimojn aŭ
pereigajn senkuraĝiĝojn.

*

Ne koleru kontraŭ malbonhumora amiko. Vi ne scias
pri ĉiuj liaj intimaj malfacilaĵoj.

*

Ne tediĝu ĉe homo ankoraŭ frivole konversacianta.
Vi ankaŭ estis tia, kiam al vi mankis sperto.

*

Ne grumblu kontraŭ junuloj malpli respondecaj. Helpu
ilin, kiel vi povos, rememorante, ke vi jam estis ventkapa
en la okuloj de multaj homoj.

*

Ne estu netolerema en ĉia ajn situacio. Horloĝo
senĉese tiktakadas, kaj vi estos surprizata de multenombraj
malfacilaj problemoj sur via vojo kaj sur la vojo de viaj
amatoj.

25

Ŝvebu pli alte

Ne vundu vin kalumnio. Vivu tiamaniere, ke neniu povu kredi al via kalumnianto.

*

Ne postrestu pro konsterniteco. Iru plu vian vojon, atentante la superajn celojn de la vivo, ĉar konfuzantoj estas sennombraj.

*

Ne doloru vin maljusta akuzo. Vi povas realigi multe da valoraj planoj, kiel rebaton al la parolo de viaj senkaŭzaj akuzantoj.

*

Ne ĉagreniĝu pro senfundamenta malkonfido. Vi ie ajn povas uzi vian bonan konsciencon en honesta laboro.

*

Ne malkuraĝiĝu pro kritiko. Se admono estas facila al ĉiu ajn, nobla realigaĵo estas verko de malmultaj.

*

Ne ĝenu vin malfavoraj opinioj. Se vi vin daŭre dediĉas al bono, la aprobo de via konscienco valoras pli multe ol ĉia eĉ plej respektinda opinio de alia homo.

26

Se vi deziras

Se vi efektive deziras esti kristano:

perdante, vi venkos sur la homa batalkampo;

cedante, vi ekhavos la necesajn rimedojn;

laborante, vi atingos vian propran feliĉon;

pardonante, vi edifos tiujn ĉirkaŭ vi;

liberigante, vi konkeros la aliajn;

eltenante, vi rezistos al tempesto;

rezignante, vi gajnos eternajn trezorojn;

benante, vi savos multajn;

suferante, vi havos pli da lumo;

vin oferante, vi renkontos pacon;

ŝvitante, vi puriĝos;

amante, vi ĉiam lumigos.

27

Malfacilaj spertoj

La korpa beleco povas naski tragediojn neantaŭvideblajn por la animo, se tiu ĉi ne havas prudenton.

*

Tro multe da mono estas pordo al mizero, se la riĉegulo ne daŭre firmigis la ekvilibron de siaj spezoj.

*

Troa komforto estas malutila, se la homo ne lernis abnegacion.

*

Alta socia rango estas prepara paŝo al laŭta falo, se la homo ne maturigis sian rezonkapablon.

*

Grandega aŭtoritato difektas la vivoĝojon, se la menso ankoraŭ ne havas klaran juĝon pri proporcioj.

*

Granda ŝarĝo da respondeco ekstermas la ekzistadon de tiu, kiu ankoraŭ ne transpasis la ordinaran komprenon.

*

Grandega kapitalo da konoj, meze de sennobraj personoj malkleraj, vulgaraj aŭ malsaĝaj, estas ia venena amara frukto, se la spirito ankoraŭ ne rezignaciis pri soluleca vivado.

28

Efektive

Gardi ne estas malkonfidi. Ĝi estas ekbruligi sian propran lumon, helpante tiujn, kiuj troviĝas en ombro.

*

Defendi ne estas kriegi. Ĝi estas pli diligente servi al aferoj kaj personoj.

*

Helpi ne estas trudi. Ĝi estas efektive kaj sen individuista sinmontrado ekpreni per la mano, por ke la helpato prosperu, ricevu klaran menson kaj estu feliĉa per si mem.

*

Lernigi ne estas vundi. Ĝi estas ame gvidi la proksimulon en la regnon de komprenado kaj paco.

*

Renovigi ne estas detruui. Ĝi estas lasi netuŝitaj la fundamentojn, sur kiuj oni rebonigu la konstruaĵon por la bono de ĉiuj.

*

Klarigi ne estas diskuti. Ĝi estas serveme kaj bonvole helpi la komprenpovon de la nescianto.

*

Ami ne estas deziri. Ĝi estas ĉiam kompreni, doni el si mem, rezigni siajn proprajn kapricojn kaj sin oferi, por ke brilu la dia lumo de la vera amo.

29

Konvenas pensi pri jeno

Pacienco ne estas bela vitralo por viaj senokupaj horoj. Ĝi estas via apogilo ĉe la survojoj malhelpaĵoj.

*

Sereneco ne estas ĝardeno por viaj oraj tagoj. Ĝi estas provizo da paco por elreviĝoj sur via vojo.

*

Trankvileco ne estas dolĉamuzika violono por viaj agrablaj konversacioj. Ĝi estas reala valoro por viaj malfacilaj interkonsentoj.

*

Toleremo ne estas ia bongusta vino por viaj minutoj de kamarada rondo. Ĝi estas valora pordo, por ke vi montru bonvolon al viaj malpli evoluantaj amikoj.

*

Bona kunlaborado ne signifas facile ricevi aliulan helpon. Ĝi estas rimedo helpi fraton, kiu havas bezonon.

*

Konfido ne estas ia nektaro por viaj arĝentaj noktoj. Ĝi estas rifuĝejo por la horoj de tempesto.

*

Optimismo ne estas senokupula kuŝoseĝo por viaj bluaj krepuskoj. Ĝi estas fonto de fortoj por viaj tagoj de lukto.

*

Rezistemo ne estas retorika ornamo. Ĝi estas subtenilo de via fido.

*

Espero ne estas ia preĝoseĝo por simpla rigardado. Ĝi estas energio por noblaj faroj, koncernantaj vian spiriton.

*

Virto ne estas ia ornama floro. Ĝi estas benata frukto el via propra penado, frukto, kiun vi devas uzi kaj sanktigi en oportuna tempo.

30

Respondoj al la rapidemo

Evitu malpaciencon. Vi jam vivis nekalkuleblajn jarcentojn kaj staras nun antaŭ senfinaj jarmiloj.

*

Konservu serenecon. Evitu tamen senokupecon, rekonante la decidigan valoron de ĉiu minuto.

*

Dissemu amon. Pensu pri la sindonemo de Tiu, kiu nin amas de la komenco.

*

Tenu vian ekvilibron. Pasioj kaj senbridaj deziroj estas detruantaj fortoj en la Dia Kreitaĵaro.

*

Estu konfidema. La suno reaperos morgaŭ en la horizonto kaj la pejzaĝo jam estos alia.

*

Intensigu vian penadon. Via vivo estos ja tia, kia vi ĝin faros.

*

Estimu solidarecon. Vi tute ne povus vivi sen aliaj, kvankam la aliaj povas en la plej multaj okazoj vivi sen vi.

*

De tempo al tempo provu sperti solulecon. Jesuo staris sola dum la plej dolorraj tagoj de sia vivo sur la Tero.

*

Plenigu viajn horojn per konstruanta laboro. Sed ne aliĝu vian ekzistadon en turon Babelan.

*

Fidele kultu al la paco. Sed ne forgesu, ke vi neniam trankvile vivos, se vi ne donos pacon al tiuj, kiuj iradas tian saman vojon, kiel vi.

31

Elmontru vin

En la agado ĉiutaga ne postulu de via kamarado edukitecon. Elmontru la vian.

*

En la taskoj por la bono ne atendu kunlaboradon. Kunlaboru mem antaŭ ĉio.

*

En la ordinaraj laboroj ne krii por aliula helpon. Prezentu vian bonvolon.

*

En la servoj pri komprenado ne petu, ke via proksimulo supreniru al vi. Lerne malsupreniri al li kaj helpu lin.

*

En la plenumado de viaj kristanaj devoj, ne atendu eksterajn rimedojn por ilin efektiviĝi. La plej bona havaĵo, kiun vi povas doni por la bonaj verkoj, estas via propra koro.

*

Ĉe la ordinaraj societaj interrilatoj en la vivo ne atendu, ke via frato elmontru jam plej altajn ecojn. Konkretigu la altajn dotojn, kiujn vi jam posedas.

*

En ĉiu terano estas lumo kaj ombro. Elmontru vian noblecon, por ke la nobleco de via proksimulo venu al vi renkonte.

32

Signoj

Via konversacio montras direktojn elektitajn de vi en la vivo.

*

Viaj decidoj en la gravaj horoj malkaŝas la efektivan evolugradon de via spirito.

*

Viaj gestoj en la ordinara lukto esprimas vian internan mondon.

*

Viaj impulsoj difinas la mensan regionon, en kiu vi preferas moviĝi.

*

Viaj pensoj montras vian spiritan societeton.

*

Viaj legaĵoj karakterizas viajn sentojn.

*

Via persona traktado kun aliaj homoj klarigas, ĝis kiu punkto vi jam progresis.

*

Viaj petoj elmontras viajn celojn.

*

Viaj opinioj konigas la ĝustan lokon, kiun vi okupas en la mondo.

*

Viaj tagoj estas premsignoj sur via evolua vojo. Ne forgesu, ke granda nombro da enkarniĝintaj kaj elkarniĝintaj amikoj konas vian personecon kaj sekvas vian iradon laŭ la paŝosignoj, kiujn vi nun postlasas.

33

Sen tiaj armiloj

Sen bonaj manieroj vi vivos sen la konfido de la aliaj.

*

Sen fortanimeco vi falos ĉe la unuaj malhelpoj sur via vojo.

*

Sen pozitiva fido vi sencele vagados.

*

Sen dediĉo al la bono via koro kruele malmoliĝos.

*

Sen noblaj ekzemploj vi senutile pasos tra la mondo.

*

Sen inda laboro tedo putrigos vian energion.

*

Sen via propra penado vi neniam atingos la Altajn Regionojn.

*

Sen espero viaj surteraj noktoj estos pli nigraj.

*

Sen kompreno via migrado tra la ombroj estos pli dolora.

*

Sen reziĝnemo vi edukos neniun.

34

Kontrolo vin

Estu ekvilibranima ĉe juĝado, elsarkante el ĝi ĉiajn inklinojn al venĝo.

*

Gardu vin kontraŭ via braveco, por ne fali en malprudentaĵon.

*

Analizu vian firmecon, por ke via koro ne ŝtoniĝu.

*

Prilumu viajn vidpunktojn, por ke ili ne aliĝu en despotecon.

*

Ekzamenu vian lertecon, evitante, ke ĝi pasu al friponeco.

*

Esploru vian doloron, por ke ĝi ne estu ribelo.

*

Bridu vian ofendiĝemon, por ke ĝi ne enloĝiĝu en la pereiga domo de malamo.

*

Zorgu pri via sincereco, por ke via parolo ne elspiru venenon.

*

Regu vian entuziasmon, por ke ĝi ne fariĝu facilanimeco.

*

Tenadu vian noblan fervoron, sed ne faru el ĝi danĝeran lernigilon pri perforto.

35

Lernu el la Naturo

La suno brilas en la altoj, por helpi ĉiujn.

*

La steloj orde grupiĝas.

*

La ĉielo havas horojn por lumo kaj horojn por mallumo.

*

Vegetaĵo forlasas malluman kavaĵon, serĉante lumon por produkti, kvankam ĝi restas ligita al la grundo.

*

Branĉo, kiu postvivas uraganon, cedis al ĝia pasado, kaj tamen tenas sin en sia propra loko.

*

Roko garantias vivon en valo, ĉar ĝi rezignaciis pri sia soleco.

*

Rivero atingas siajn celojn, ĉar ĝi lernis ĉirkaŭiri obstaklojn.

*

Ponto utilas al publiko sen esceptoj, ĉar ĝi firmiĝas sur ekstretoj.

*

Vazoj servas al argilaĵisto, post kiam ĝi elportis la temperaturon de la fajro.

*

Ŝtono brilas, post kiam ĝi suferis de la fajliloj de facetisto.

*

Kanalo plenumas siajn celojn, ĉar ĝi ne forlasas sian fonton.

*

Semado ĉiam produktas laŭ la deziroj de semanto.

36

Laŭ bona logiko

Kiu malamon nutras, tiu fajron ĵetas en sian propran koron.

*

Kiu nutras malvirton, tiu fariĝas al ĝi sklavo.

*

Kiu sin donas al senokupeco, tiu amasigas neĝon ĉirkaŭ si.

*

Kiu koleras, tiu estas mem turmentisto de sia animo.

*

Kiu amas mallaŭdi, tiu ĵetas ŝtonojn kontraŭ sin mem.

*

Kiu kreas malfacilajn situaciojn, tiu plimultigas la malhelpojn, en kiuj li troviĝas.

*

Kiu rapidece juĝas, tiu estas ĉiam juĝata rapidece.

*

Kiu fariĝas specialisto pri eltrovado de malbono, tiu malfacile vidas bonon.

*

Kiu ne deziras porti jugon, tiu ne kapablas servi.

*

Kiu senĉese lamentadas, tiu irados sub pluvo da larmoj.

37

Liberigu vian animon

Ne kateniĝu al la beleco de l' efemeraj formoj. Floro baldaŭ forvelkos.

*

Ne amasigu multekostaĵojn, kiuj pezus en la pesilo de la mondo. Ĉenoj el oro ligas tiel forte, kiel mankatenoj el bronzo.

*

Ne sklaviĝu al la opinioj de ventkapuloj aŭ malkleruloj. "Incitatus", ĉevalo de Kaligulo, povis manĝi el sitelo ornamita per perloj, tamen malgraŭ tio ĝi ne ĉesis esti ĉevalo.

*

Ne nutru la avidecon pri posedaĵoj. La domoj de numismatoj estas ĉiam plenplenaj de moneroj, kiuj servis al milionoj da homoj kaj kies posedantoj jam malaperis.

*

Ne perdu vian konstruantan liberecon pro homaj vidpunktoj. Kaptilo, malliberiganta danĝeran beston, estas egala al tiu, surprizanta senzorgan kanarion.

*

Ne kredu al laŭdo, kiu atribuas al vi imagitajn kvalitojn. Kruelaj vespoj kelkfoje sin kaŝas en la kaliko de lilio.

*

Ne turmentiĝu per la sopirego ekhavi iajn tujajn superaĵojn dum la surtera elprovado. La muzeoj dormadas plenŝtopitaj per vestoj de reĝoj kaj de aliaj “kadavroj de mortintaj superaĵoj”.

38

Ne difektu vian tagon

Via incitiĝo solvos nenian problemon.

*

Viaj ĉagrenoj ne ŝanĝas la naturon de la okazaĵoj.

*

Viaj elreviĝoj ne faras tian laboron, kiun nur la tempo sukcesos plenumi.

*

Via galhumoro ne modifas la vivon.

*

Via doloro ne malhelpos, ke la suno morgaŭ brilu super bonuloj kaj malbonuloj.

*

Via malĝojo ne prilumos vojojn.

*

Via senkuraĝeco edifos neniun.

*

Viaj larmoj ne anstataŭas la ŝviton, kiun vi devas verŝi por via propra feliĉo.

*

Viaj plendoj, eĉ tiuj el la koro, neniam aldonos ĉe aliaj eĉ unu gramon da simpatio al vi.

*

Ne difektu vian tagon. Lernu el la Dia Saĝo senfine senkulpigi, ĉiam konstruante kaj rekonstruante por la senlima bono.

39

Kun Jesuo

Abnegacio estos al vi privilegio.

*

Sufero glorigos vian vivon.

*

Provado grandigos vian povon.

*

Laboro estos konfidente sur via vojo.

*

Oferado plej altigos viajn impulsojn.

*

Malsaneco de la korpo estos saniga medikamento por via animo.

*

Kalumnio honorigos vian taskon.

*

Persekutado kontraŭ vi estos motivo, por ke vi benu multajn.

*

Angoro plipurigos viajn esperojn.

*

Malbono invitos vian spiriton al farado de bono.

*

Malamo ekscitos vian koron al elmontoj de amo.

*

La Tero kun siaj kontrastoj kaj senĉesaj renovigoj estos por la individua pliboniĝo benata lernejo, per kies purigaj lecionoj vi forlasos la egoismon, frakasitan por ĉiam.

40

Vi povas kredi

Se vi en ĉiu momento parolos pri boneco, sed tamen ne estos bona, tio estos senutila por via feliĉo.

*

Se via mano skribos belajn paĝojn, laŭ supera inspiro, kaj vi tamen ne stamos ilian belecon en via spirito, vi estos ia simpla seninteligenta stafeto.

*

Se vi legos mirindajn librojn kun emocio kaj larmo, sed tamen ne efektivigos tion, kion vi legis, vi estos nenio alia ol tre malbona registrilo.

*

Se vi pie tenados sincerajn konvinkojn pri fido, sed tamen ne renoviĝos por la bono laŭ tiuj konvinkoj, via menso estos nura hoko kun religiaj sentencoj.

*

Se via gvidkapableco disciplinos multe da homoj, plibonigante ilin, kaj vi tamen ne disciplinos vin mem, la Leĝo traktos vin kun tia sama severecco, kun kiu ĝi uzas vin por perfektigi la aliajn.

*

Se vi perfekte konos la lecionojn por via vojo kaj, en la mortemaj okuloj de la mondo, iros en la societeton de herooj kaj sanktuloj, sed tamen ne praktikos la bonajn instruojn, kiujn vi konas, vi antaŭ la Diaj Leĝoj ĉiam rekomencos vian laboron, ĉiufoje pli kaj pli malfacile.

*

Se vi jene vokos al Jesuo: Majstro kaj Sinjoro..., sed tamen ne volos lerni servi kun li, viaj vortoj sonos sen ia senco.

41

Defendu vin

Ne ŝanĝu viajn orelojn en ian svarmejon de onidiroj.
Intrigo estas ia vipuro, kiu ennestiĝus en via animo.

*

Ne turnu viajn okulojn en vidilojn de la klaĉemo.
Tiuj bildoj, kiujn vi misformus, sin montrus ĉiam
kripligitaj sur la ekrano de via menso.

*

Ne faru el viaj manoj lancojn por lukti sen profito.
Uzu ilin por la semado de bono.

*

Ne malnobligu viajn kreipovajn kapablojn, centrante
ilin en la mundumaj plezuroj.

Vi respondos pri tio, kion vi faros el ili.

*

Ne trudu al via imagemo konstantajn ekscitiĝojn.

Viaj malnoblaj kreaĵoj turmentus vian internan mondon.

*

Ne konduku viajn sentojn en la malsanecan plezuron suferi.

Instruu ilin ĝui la plezuron servi.

*

Ne elzorgu por vi la vojon al la paradizo, indikante al la aliaj la vojon al la infero.

La irejo al la ĉielo estos konstruata interne de vi mem.

42

Vi mem

Memoru, ke vi mem estas

la plej bona sekretario de via tasko,
la plej aktiva propagandisto de viaj idealoj,
la plej klara demonstracio de viaj principoj,
la plej alta normo de la supera instruo, kiun via spirito
sekvas,

kaj la vivanta mesaĝo de la altaj pensoj, kiujn vi
komunikas al aliaj.

Ankaŭ ne forgesu, ke

la plej granda malamiko de viaj plej noblaj faroj,
la plena aŭ parta negacio de la altega idealismo, kiun
vi diskonigas,

la disonanca noto de la simfonio de la bono, kiun
vi deziras ludi,

la arkitekto de viaj afliktoj,
kaj la detruanto de viaj okazoj de altiĝo – estas
vi mem.

43**Personaj problemoj**

Vivanta fido ne estas transdonebla hereda propraĵo.
Ĝi estas persona konkero.

*

Vera feliĉo ne estas pruntebla varo. Ĝi estas intima realiĝo.

*

Ĉiela graco ne hazarde venas. Ĝi devas esti meritita.

*

La plej bona karito ne estas tiu farata pere de aliaj.
Praktiki ĝin devas ja ni mem.

*

Morala forteco ne estas ia rezulto de aliulaj petoj.
Ĝi originas el nia klopodo persiste agadi por la bono.

*

Fidela espero ne fiksiĝas en nia koro per simpla infekto. Ĝi estas frukto de pli alta kompreno.

*

Vera amo ne naskiĝas el la ombroj de deziro. Ĝi estas neelĉerpebla kristalklara fonto el la eterna spirito.

*

Reala scio ne estas ia en kelkaj tagoj farita konstruaĵo. Ĝi estas verko de la tempo.

*

La paradizo neniam estos akirita per ruza aĉeto. Ĝi estas atingebla nur per nia forta volo eviti la purgatorion aŭ la inferon en nia propra konscienco.

*

Neneigebla estas la protekto de la Supera Sfero al ni ĉiuj, kiuj ankoraŭ moviĝas en la ombro. Tamen, ve al ni, se ni ne serĉas la benojn de la lumo! ...

44**Ŝvebu super ĉio**

Antaŭ bloko el kruda ŝtono, ne alforĝu vin al la ideo pri ia pezo. Pensu pri la artisma statuo, kiu povos kreiĝi el ĝi.

*

Rigardante la malfacilaĵojn de la semado, ne deturnu vin, timante pluvtorentojn kaj fivermojn. Memoru la panon, kiu plenigos vian provizejon.

*

Starante antaŭ tempesto, ne dronu en lamentado, Meditu pri la bonajoj, kiuj venos post ĝia forpaso.

*

Ĉe malfacilega laboro, ne timu la ŝviton, kiu abunde fluos. Atendu la bonajn verkojn, kiuj rezultos el ĝi.

*

Ne timu la varmon de la forĝejo. Atendu la utilaĵojn, kiujn ĝi liveros por via vivo.

*

Ne prezentu al vi nur la danĝerojn de malsano. Kunkalkulu la ĝojon kaj la kapablon kuraci.

*

Se vi efektive estas regata de nobla idealo, forgesu viajn defalintan amikon, forkurintan edzinon, sendankan kamaradon kaj nekompreneman fraton. Ili ĉiuj estas lernantoj kaj preterpasantoj, kiel vi mem... Gravaj ja estas la intensigo de la lumo, la progreso de la vero kaj la venko de la bono.

45**Ĉiam vokata**

Kristano estas vokata al servado ĉie.

*

En la domo de sufero li donos konsolon.

*

En la kaverno de malklereco li donos klarigojn.

*

En la kastelo de plezuro li instruos moderon.

*

Ĉe la abismo de krimo li evitos falojn.

*

En la turnovento de ekscesoĵ li ekzemplos sobrecon.

*

En la kabano de mallumo li ekbruligos lumon.

*

En la nebulo de senkuraĝeco li malfermos pordojn
al bonhumoro.

*

En la infero de malamo li disverŝos benojn de amo.

*

En la medio de malicemo li disdonos bonon.

*

En juĝejo li image sin metas en la lokon de juĝato,
por esplori aliulajn erarojn.

*

En ĉiu anguloj de la vojo ni renkontas inspirojn de
la Sinjoro, kiuj invitas nin al servado.

46

Profitu la oportunan okazon

Ne via cedema kamarado postulas vian urĝan fratan komprenemon, sed tiu, ankoraŭ klopodanta por jungi la sovaĝecon de la koleremo en sia propra brusto.

*

Ne via frato, plene konanta la Evangelion, bezonas vian neprokrasteblan zorgadon, sed tiu, ankoraŭ ne sukcesinta elpeli el sia koro la vipuron de la malicemo.

*

Ne via amiko, pace iranta sur la vojo de bono, bezonas vian konstantan helpadon, sed tiu, implikiĝinta en la labirinto de malkonkordo kaj nekompreneo, sen fortoj por reveni sur la rektan vojon.

*

Ne tiu homo, kiu vivas en sia ordinara laborado, postulas urĝan helpon, sed tiu, kiu ne havis rimedojn

sufiĉajn por venki la premantajn cirkonstancojn de la homa spertado kaj falis en la malluman regionon de menskonfuziteco.

*

Tre verŝajne via kunlaborado en la paradizo estas nun tute ne necesa; sed nediskutebla realaĵo estas tio, ke via loko por servi kaj lerni, helpi kaj ami, estas ja la Tero mem.

47

Petoj

Dum via preĝado vi petas radion de lumo, preskaŭ ĉiam forgesante, ke vi havas sub via dispono la Sunan Fokuson por ke vi plenumu la Diajn Decidojn.

*

Via spirito petas iom da amo, dum ĉirkaŭ vi la homaro atendas elmontron de via kapableco ami.

*

Vi petas, ke oni donu al vi komisionojn, kiuj kapabligus vin kunlabori kun la Dia Saĝo, sed vi forgesas, ke milionoj da estuloj atendas vian decidon servi, en nomo de la Ĉiela Patro.

*

Via koro petas ĉielajn signojn, sed, dum la Saĝulo

inter la Saĝuloj kolorigas florojn kaj horizontojn por viaj okuloj, vi serĉas vanajn distraĵojn kaj vidas nenion.

*

Vi postulas justecon por viaj personaj aferoj, sed vi ĉiutage komplikas situaciojn kaj problemojn, ne rimarkante, ke la Superega Harmonio ĉiam korektas maljustaĵojn ĉirkaŭ vi pere de doloro kaj morto.

*

Vi deziras okazojn por grandiĝi kaj altiĝi en la supera spiriteco, sed vi ofte evitas la ŝtupojn de la laborplena kaj modesta klopodado ĉiutaga, al vi donitajn de la Senlima Boneco kiel favorkoraĵon.

*

Se vi senĉese petas pri eterna feliĉo, sed rifuzas la rimedojn por ĝin akiri, kion do vi atendas sur la vojo?

48**Konsultu la bonon**

Klaĉemulo deziras, ke vi, same kiel li, rimarku la malkorektaĵojn de la aliula vivo.

*

Hezitema kaj malfortanima homo imagas al si, ke viaj fortoj estas facilrompeblaj.

*

Diskutanto deziras vian aleston ĉe disputoj pri ĉio kaj pri ĉiuj.

*

Sendankulo ne ĝojas, vidante vin danki al aliaj.

*

Memadoranto ne ĝojas, vidante vian respekton al la kontraŭuloj.

*

Ribelanto penas meti sur vian vizaĝon la maskon de ribelo.

*

Nekomprenema homo penas dronigi vian menson en profundajn konfuzojn.

*

Neŭrasteniulo petas vin ne ridi.

*

Malsaĝulo postulas, ke vi estu same malsaĝa.

*

Homo, ankoraŭ ne tute rompinta kun la surteraj ligiloj, ĉiam penas egaligi siajn similulojn al li mem. Tamen memoru, ke vi estas vi mem, homo, havanta tute propran taskon kaj malsamajn prirespondojn, kaj se vi aspiras realan feliĉon, ne forgesu konsulti modelajn bonfarantojn, kun la Kristo, en ĉiuj horoj de via vivo.

49**Helpu vin mem**

Deziru nenion de via najbaro, krom la noblaj kvalitoj,
ornamantaj lian spiriton.

*

Ne permesu, ke ĉagrenoj prenu la direktilon de via
destino.

*

Ne cedu la templon de via menso al la malbonaj
impresoj.

*

Ne forigu vian spertadon de sur la spiritaj
fundamentoj.

*

Ne forgesu, ke la altega idealo, objekto de via admiro,
devas iam korpigi sur viaj vojoj.

*

Ne katenigu al la malbono, tamen ne flanken metu
viajn devojn de frateco al tiuj trafitaj de la malbono.

*

Ne estingu la torĉon de la fido dum viaj helaj tagoj,
por ke ne manku al vi lumo dum la ombraj tagoj.

*

Ne malakceptu la lecionojn de la evolucia vojo, kiel
ajn malfacilaj kaj doloraj ili estas, por ke la vivo iam
malfermu al vi la sanktejon de la saĝo.

*

Ne ŝparu tempon en la konstruado de ĉio bela, eterna
kaj bona.

*

Ne forgesu, ke justeco starigas la universalan ordon,
sed nur amo plivastigas la dian verkon.

50**Konkludoj**

Sendube la surtera vivo estas benata lernejo; sed se vi ne profitos el ĝi, por sufiĉe ellerni la lecionojn destinitajn al via spirita altiĝo, nenion helpos al vi eniri en la kurson de la homa vivado.

*

Sen ia dubo la vojo de la bono estas peniga kaj malfacila, sed se vi ne decidis sekvi ĝin, neniu liberigos vin de la danĝera influo de la malbono.

*

Nekontesteble la eterna feliĉo estas nobla realaĵo, for de la pasemaj kadroj de la karno; sed se vi deziras obstine restadi sur la kampo de la facilaj kaj malnoblaj plezuroj en la pli malaltaj sferoj, interne de ili vi senfine vagos.

*

Dio nediskuteble estas kun ni en ĉiaj cirkonstancoj, sed se vi ne estos kun Dio, neniuj povos antaŭvidi, ĝis kie via spirito malsupreniros en la regionoj de maltrankvilo kaj ombro.